

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago N°11 Novembro, 2009


Kara Leganto, kiel kutime, E-vivo en Ŝikago dum la lasta monato estis bunta: nin vizitis d-ro I. Galajčuk (Ukrainio), nia "Doktorino" G. Novak dum la tuta tago laboris por IL, alia membro – Davido K. "veturigis" nin al Italio de Mussolini. Bonvolu legi sube pri ĉiuj eventoj.

Italio de Mussolini

Davido Kirschbaum

La vivo en Italio de Benito Mussolini (sur la foto – familia flago de Mussolini) ne estis tre malsama de la vivo en aliaj totalitaraj landoj kiel Germanio aŭ Rusio. La nazia Germanio kaj la Stalina Rusio uzis evoluaĵojn, kiuj ekzistis en Italio ekde la 1920aj jaroj. La homoj havis malmultan kontrolon je ilia persona vivo kaj la ŝtato kontrolis preskaŭ la tutan vivon de siaj civitanoj. Ĉiuj italoj devis obei al Mussolini kaj lia faŝista partio. Aŭtoritato estis efikigita per agado de la Nigraj Ĉemizoj – la nomo de la "Fasci di Combattimenti." La viroj en tiu ĉi grupo estis kutime ekssoldatoj kaj ilia tasko estis obeigi tiujn, kiuj oponis Mussolini-n. Nigraj Ĉemizoj mortigis socialiston Matteoti-n – malkaŝema kritiktisto de Mussolini. Kvankvam ili estis malpli timigaj ol la Sekreta Polico de la Hitlera Germanio, la Nigraj Ĉemizoj subtenis "feran ordon" en Italio. Unu el metodoj por "konvinki" homojn estis ligo de maobeemulo al arbo kaj devigi lin trinki ricin-oleon kaj manĝi ranon aŭ bufon. Tiu puno estis sufiĉa por certiĝi, ke la homoj tenis liajn pensojn al si. La mortigaj taktikoj, kiujn uzis la Gestapo kaj SS en Germanio, kutime ne estis uzitaj en Italio. Kiam Mussolini unufoje diris "Italio volas pacon kat kvieton. Mi donos ĉi ecojn kun amo, se eblos, kaj kun forto, se estos bezonata", la mesaĝo estis klara; tiuj, kiuj volis oponi Mussolini-n, ricevos fortan punon.

Italio sub Mussolini havis sekretan policon. Ĝia nomo estis OVRA. Ĝi estis kreita en 1927 kaj ĝin estris Arturo Bocchini. La mort-puno estis restaŭrita pro seriozaj ofendoj. Sed ĝis 1940 nur dek personoj ricevis de OVRA mort-punon. Tiu nombro estis multe pli malgranda, ol



la nombro de kondamnitaj en la nazia Germanio. Italoj konstruis malliberejojn en malproksimaj mediteranaj insuloj, kiel Ponza kaj Lipari. Kondiĉoj tie estis krudaj por la arestitoj kaj pro tio multaj kontraŭ-faŝistoj simple fuĝis el Italio.

Edukado en faŝista Italio

La infanoj estis la estontaj faŝistoj kaj Mussolini interesiĝis multe pri la ŝtata eduka sistemo kaj junularaj organizoj. Hitlero faris same en nazia Germanio. Mussolini bezonis landon de militistoj. Knaboj devis iĝi "sovaĝaj" militistoj, kiuj batalos por la gloro de Italio. Knabinoj devis iĝi bonaj patrinoj, kiuj donis al Italio kuraĝajn civitanojn, kiujn ĉi tiu granda nacio devas havi. Infanoj estis instruitaj, ke la grandaj tagoj de la moderna Italio komenciĝis en 1922 kune kun la Marŝo al Romo. Instruistoj edukis infanojn, ke Mussolini estis la nura homo, kiu povas gvidi Italion reen al la grandeco. Ili instruis infanojn, ke Mussolini nomiĝas "Il Duce" (la Estro), kaj ili kuraĝigis knabojn ĉeesti kunvenojn de postlernejaj junularaj movadoj. Tri movadoj ekzistis. La Filoj de la Lupino, por 4-8-jaraj infanoj. Ilia uniformo estis nigra ĉemizo. La "Balilla" estis por infanoj 8-14 jaraj. Ili portis nigrajn ĉemizojn, nigrajn ĉapojn, mallongajn pantalonojn kaj grizajn ŝtrumpetojn. La grupo "Avanguardista" unuigis 14-18 jarajn junulojn. Ilia uniformo estis la sama kiel Balilla, krome ili surmetis genupantalonojn. La estroj instruis al knaboj, ke la batalado esti natura parto de ilia vivostilo. Fama faŝista slogano estis "La milito estas por viro la sama, kiel naskado por virino". Geknaboj estis instruitaj, ke ili devas obei al estroj. Tio ne estis nekutima en diktatorejo. Kiam la OVRA punis plenkreskulojn, kiuj malobeis al ŝtato, ĉiuj estontaj plenkreskuloj de faŝista

Italio estus modelaj civitanoj kaj obeus al la leĝo. Knaboj partoprenis militajn ekzercojn dum ili estis membroj de Balilla. Ili marŝis kaj uzis imititajn pafilojn. Mussolini iufoje diris: “Mi preparas junulojn batali pro vivo, sed ankaŭ – pro la nacio.” Membroj de Balilla devis memori la vortojn: “Mi kredas je Romo la Eterna – Patrino de mia lando... Mi kredas je la genio de Mussolini... kaj je la releviĝo de la Imperio.” La gloro de la antikva Roma Imperio estis kiel fono de multaj aferoj, kiujn geknaboj faris. Infrano en la junulara movado estis legionano. Plenkreska oficiro estis centestro. Tiu rememorigas la tempom, kiam la antikva romia armeo superigis preskaŭ la tutan Eŭropon...

Vizito de E-doktoro

Oktobre en Ŝikago estis organizita scienca onkologia konferenco, kiun partoprenis reprezentantoj de la partneraj urboj. El Ukrainio venis d-ro Igor Galajĉuk – kuracisto, scienculo, Esperantisto de 1979, prezidanto de E-klubo “Spinofloro”. Iam ni kune elesperantigis (en la ukrainan) libron pri Yumejho-terapio. Estis interese, ke renkontinte s-ron Igoron, mi parolis ankaŭ kun kuracistoj kaj doktoroj de la aliaj partner-urboj, kiel Ateno, Osako, Vilno, kaj substrekis pri la utileco de E-o. Alloke, d-ro I. Galajĉuk (meze sur la foto, dekstre – d-ro el Osako) planas prelegi pri iu fako de onkologio dum Internacia Universitato en Havano – gastiganta urbo de UK'2010.



Festsemajno en “Malcolm X Kolegio”

Laŭ informo de nia sekretario, s-ino Gertrude Novak, la 12-17an de Oktobro en urba kolegio “Malcolm X City College”, okazis festsemajno, dum kiu ŝi administris tutagan prezentadon de E-o. En la vestiblo estis aranĝita informtabulo kaj en apuda salono ankaŭ estis organizitaj du unu-horaj neformalaj prezentoj de IL. G. Novak, faris liston de 11 ekinteresintoj, kiuj estis invitatitaj al la kunsido de E-societo kaj al Zamenhofa tago'2009. Prezidanto de la Kolegio Ghingo Brooks tre entuziasmiĝis pri E-o kaj li instigis kaj kuraĝigis ĝian enkondukon. Espereble, E-kurso ekaperos en la Kolegio. Gratulojn al nia “Doktorino” Gertrude!

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

- 24an de Novembro – elekto de nova gvidantaro. Viktoro prezentos tradukarton kaj ATA-on
- 13an de Decembro – Zamenhofa tago okazos je kutima tempo (12:00 – 4 pm) en la salono de “SkyLine at Evanston”
415 Howard St., Evanstono, IL 60202

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon
de ĉiu monato
en:**

Sulzer Public Library, 4455 N.
Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

